

Heroldo de HEL

N-ro 51 januaro-februaro 1994

ORGANO DE
HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

北海道エスペラント連盟

062 札幌市豊平区旭町4丁目1番40号
北海学園大学 切替英雄 気付
HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO
Kirikae-Hideo, Hokkaigakuen Daigaku,
Asahimachi 4-1-40 Tojohira-ku,
Sapporo-shi, 062, Japanio

ENHAVO

Nia vizito al s-ro Y. TAKAHASI en
Hospotalo

病院へ高橋要一氏のお見舞に
YAMAGISI Etuko 山岸悦子 2

Rememoro de 「Transdono-Tabulo」
TTの頃
SASAKI Masato 佐々木将人 3

Ĉu mi sukcesis deĉifri?
ザメンホフの筆跡判読その他
Acuŝi HOŝIDA 星田 淳 5

Fabelo 『Vizito al novaj amikoj』
新しい友人達を訪ねて
KAWAHARA H. Kazuya カワハラカズヤ 6

Novjara Kunveno(Bankedo) de TES
苫小牧エスペラント会新年会など
(アイヌ新法エスペラント語に)
Acuŝi HOŝIDA 星田 淳 11

Lernado 学習の頁
Mituisi K 三ツ石 清 12

La una Novjara Kunveno(Bankedo) de HEL
HEL 新年会——初めての試みだが——
Acuŝi HOŝIDA 星田 淳 14

POEMO 『Patrino Amo』 詩『母の愛』
KAWAHARA H. Kazuya カワハラカズヤ 14

S-RO NIŜISATO EN TORONTO
トロントの西里氏
(bedaŭrata) Nagata Akiko 故永田昭子 15


KIEL FIASKI ESPERANTION
エスペラント界をダメにするもの 18

CERTIGO AL MIA OPINIO
私の意見(前頁)への補足
KAWAHARA H. Kazuya カワハラカズヤ 19

名前のローマ字表記について
Mituisi K 三ツ石 清 19

El redakto 編集部から
Ejko ABE 阿部映子 20

INFORMO La kunloĝado de Esperantistoj
en Hokkajdo 1994
お知らせ 1994年北海道エスペラント合宿
Ejko ABE 阿部映子 20



12
次回のHEL役員会は、4月14日(火)午後7時から、京王プラザホテル1階喫茶店「樹林」(札幌市中央区北5西7)で開催します。役員以外で時間に余裕のある方の参加も大歓迎です(飲食代は個人負担ですがぜひどうぞ)。

Nia vizito al s-ro Y. TAKAHASI en hospitalo

病院へ高橋要一氏のお見舞に



YAMAGISI Etuko 山岸悦子 (Sapporo)

En la 11-a de januaro 1994, ni tri membroj vizitis s-ron Takahasi en la hospitalo, kie jam longe li penas sin resanigi.

S-inoj Watanabe kaj Segawa, kaj mi kuniĝis en la stacidomo del` subtera trajno "HIBARIGAOKA", de kie ni piediris la lokon.

Estis tre malvarme, sed ni facile trovis la hospitalon. Videble, la nove konstruita hospitalo situas oportune laŭ la ŝtato-vojo (Kokudō 12 gosen) kaj aspektas komforte al malsanuloj.

Li estas kun ses personoj en la ĉambro de kvara etaĝo. Kiam ni iris en lian ĉambron, li forestis pro trejnado resanigi siajn manon kaj gambon.

Ĉirkaŭ unu horon ni atendadis lin ĉe la seĝo antaŭ la vendejo de hospitalo. Post tio ni denove eniris lian ĉambron kun streĉa kaj timida koroj; ĉu lia sanstato estus iom bona aŭ ankoraŭ nebona?

Ni ja trovis lin sur la lito ordiganta trejnan vestaĵon per sia mano, kiu bone funkcias. Kiam ni vidis tian, ni sentis nian maltrankvilecon forvaporigi kaj tuj en ni regis gaja humoro: Kompreneble ni gajulinoj lin salutis varme kaj laŭtvoĉe !

Fakte, malgraŭ tio ke li suferas de maldekstra hemiplegio, tamen al ni ŝajnas, ke li estas preskaŭ sana persono: ĉar li povas klare paroli. Miene serena kaj brilanta li estas !

Li montris al ni sian paralizitajn manon kaj gambon por ke ni sciu kiel ili ekfunkcias plibonigante pere de penega trejnado.

Rigardante kaj aŭdante lin ni neniel povis deteni nin de larmiĝo kortuŝite, kaj ni gestplene esprimis nian ĝojegon revidi lin. Li rakontis al ni emocie, ke li vivas ĉiam kun Esperanto en la hospitalo, kaj Esperanto donas al li esperon kaj fervoron resaniĝi.

Fakte, troviĝis kelkaj Esperantaj libroj sur lia lito. Jes, ni povas bone kompreni lian rakonton, kiel Esperanto grave kontribuas por resaniĝo de lia korpo.

Ni do proponis al li, ke ni akompanu lin per veturseĝo al la sabata-kunsido iam en la bela vetero. Li kore konsentis kun plezura rideto.

Certigante ke ni nepre realigu la promeson kun li, ni diris "Ĝis revido!". Post foriro de li ni eniris iun kafejon kaj gaje interbabiladis kun ankoraŭ restanta ekscito, kaj kiam ni revenis konscie nin, la suno jam malsupreniĝis.

..... Jen tiel komforta tago estis por ni !

TTのころ……

SASAKI Masato 佐々木 将 人

1 前ふり

本当は辞退してたんだよね、この原稿を書くって話。最初は河原さんからの依頼だったんだけど、「これこれこういう理由で、書けないよ。」と断わった。その後、河原さんから再度の依頼があって、加えて星田さんからも依頼されたんで「これこれこういう理由で（以下同文）」と断わったものの、「佐々木君も関わっていたのであれば、書いてもいいと思う。」とにごやかに勧められてしまい、書くことになってしまった。

星田さんの笑顔にはかなわないなあ（笑）。

で、どうして書けないかという理由。これを書くことが実はTTの話になってしまうのです。

2 TTの話、本体

北海道大学法学部の場合、教養課程（2年生の前半まで）と専門課程（2年生後半から卒業まで）とが、「教養部」「法学部」とわかれているのですが、私が札幌でエスペラント語を学んでいた時期は、「法学部」在籍時期ときれいに一致します。西暦で書けば1984年10月から1987年3月まで。その中のX年X月、当時のクラスでこんな会話がなされました。

「自分たちの機関紙を作ろうじゃないか。」

言いだしたのはAさん。これはただちに賛成されました。そして、その形式が問題になった時にBさんが、

「各自がはがき大の紙に直接書いて、それを集めてコピーすれば、それでできあがり。」といかにも安直そうな意見を言ったところ、これまた賛成。

題名はちょっと悩んだけど「伝言板をエスペラントで言うと……」とCさんが言って、

「Transdono Tabulo」に決定したのでした。

当時このクラスには「言いだしっぺが責任者」という原則がありまして、機関紙の形式について発言したBさんが幹事となって原稿を集めることになったのです。

その後、TTは数号発行されましたが、Bさんの怠け癖がいかに発揮されて自然消滅します。

今から振り返ってみてもTTは機関紙の定石から離れたものでした。まず編集責任者がいなかったこと。Bさんは原稿集めの担当をしていますが、原稿は取捨選択せずそのまま載せています。編集者には編集権があって、原稿の取捨選択、場合によっては修正を指示

する権限を持っていますが、TTにはその意味での編集は行われていず、編集者もいなかったのです。まさにクラス全員で作っていたのです。

もう一つの特徴は「原稿をそのままコピー」に見られるように、いわゆる紙面のレイアウトを考えていなかったことです。当時のクラスでも話が出たのですが、新たに打ち直すとなると手間が大変かかります。しかも特定の人間にその負担が集中してしまいます。特定の人間に負担が集中するようでは、活動としては発展しないのではないか。（その人ができなくなったらどうする？）そういう理由からあえて手間のかからない方法をとったのです。

3 そこで人名を明かしたかったのだが……。

Bさんは私（佐々木）です。こういう経過をたどったTTについて、私がおかしくするのはおこがましいという気持ちは実は今もあります。まあ、「関わっていた」ことは間違いないので、最終的には引き受けたのですが……。 （でもやっぱりたいしたことは書けませんでしたね。）

で、私の記憶ではAさんが河原一弥さん、Cさんが宮井康夫さんとなっているのですが、当の河原さんから「私は参加してませんよ。」と言われ、？がついてしまった……。

そうすると2の話もあやしいもんだなあ。

その後、私は旭川ー東京ー函館と転勤し、4回も引越をしているので、（おや、回数があわないぞ。）TTもどこかに行ってしまいました。

TT全部持っている人はコピーを編集部に送るように。（笑）

どんな情報でもかまいません……。 （爆笑）


4 TTふたたび。

私を書いたTTの原稿で印象に残ったことがありまして、その一つが「とてもやさしい作文」。J E I機関誌ROの「やさしい作文」よりやさしい（ご存知のとおり「やさしい作文」には結構落とし穴があって、満点を取るのは結構至難の技）それでいてよく使いそうな表現を出題したつもりだったのです。ところが、よく使う表現（言い換えれば身近な表現）は意外に難しいのですね。こっちが用意していた以外の答えが応募されてきて、（当然そっちの方ができがよさそう……。）大慌てしたという。

もう一つがコンピューター。Prologという言語を小さいコンピューターにのせて、エスペラント語を理解させようとするのだけど、Prologの方に何かミスがあって思い通りに動かないって話を書いているんです。

あれから8年。コンピューターは日に日に安く、日に日に高性能になり、Prologを自分の小さい機械に自分で入力しなくとも、もっと性能のよい機械にできあいのやつを持ってくればよい状況になりました。それどころかエスペラント語を扱えるエディタまで登場しています。(UNIXの世界ではEma csというエディタを多言語対応にしたmuleというプログラムの製作が進んでおり、文字セットの一つにエスペラント文字も入っている。)また、電話回線を使ってコンピューターをつなぎ情報を交換することが、個人単位でたやすくできるようになりました。

もしふたたびTTを作る話になったなら……。また私は「原稿持ちよってコピー」方式を主張するでしょう。で、メンバーが全員コンピューターと電話回線を持っていたら、コンピューターネットワークを組むことを考えます。現在のコンピューター通信で行われていることは、各自が情報を持ちより、各自が読んでいくという構造です。(それが時間差なしに行われるわけだから。)これってTTの発想と同じですよ。こういう極楽気楽な機関紙があってもいいと思いますし、現在では必ずしも「紙」にこだわる必要もないと思うのです。(まあそれはきちんとした機関紙の存在を前提にしている話なのですが。)



Ĉu mi sukcesis deĉifri? —ザメンホフの筆跡判読その他

Acuŝi HOŝIDA (Tomakomai)

N-ro 50, P25のザメンホフの字、こう読めませんか。

Bad Neuenahr. [?] ⇨ Bad Neuenahr.

Vina Erna. [?] ⇨ Villa Erna.

[tante mian ⇨ elektante min

つまり第1行は発信地、手紙の右上に書く地名ですがドイツのケルンに近い温泉地で、ザメンホフ一家は1913年のBerna UKの前7月18日から8月23日迄滞在していました。第2行は宿の名前、Villa はエスペラントでは villoか vilaoです。

この頃のことはこの本(エスペラントの創始者ザメンホフ、マジョリー・ボウルトン著、水野義明訳)の251~254頁に出ています。

民族によって、又個人によって筆跡お違い、慣れるには時間がかかりますが、慣れれば筆跡で「一人かな?」と見当つくこともあります。さてこの判読で一応意味は通ずると思いますが。

なおこの発信地、この本のなかでは「ノイエナル温泉」となっていますね。(251頁最終行など)

VIZITO AL NOVAJ AMIKOJ

Invitite de la letero de s-ro Blato (n-ro 50), la 15-an de decembro mi vizitis la kunsidon de la klubo en la parko Maruyama-Kôen, Saporu. Tiun tagon neĝis kaj frida vento pikis min, sed varma amikeco akceptis min, tuj post kiam mi frapis la pordon de la Tropika Domo, kiel se mi estus malnova amiko de la klubo. Mi estis ege emociita de la afabla regalo de la klubanoj per kolgirlando, kiu min rekonigis ke mi ĵus alvenis al tropikejo. Malsupre vi vidos mian raportafon pri la kunsido kaj la klubo. Mi esperas ke mia pulmo sukcesos imagi la atmosferon al vi kaj ke amikeco inter la klubo kaj ni pliprofundigos.

La kunsido malfermiĝis per solena kantado de koruso el s-roj pingvenoj, kiuj staras sur blanka scenejo el glacio kaj vestas sin per frako. Jam de la ekpaŝo de la kunsido plenplenis nova sento! Salutis s-ro Elefanto, prezidanto de la klubo. Post esprimiĝo de sia ĝojo renkontiĝi kun gastoj kaj klubanoj, li emfazis danĝeran situacion de planedskala progreso de naturdetruado far homoj. ---"Ankaŭ ni estas Teranoj. Ju pli disvastiga la naturdetruo, des pli danĝera nia vivo. Ni uzu nian lingvon por medi- kaj bestprotektado. Savi amikojn en krizo de ekstermo estas sankta devo de l' Bestaro. Precipe urĝa kaj grava estas persista postulado de observado de Vaŝingtona Pakto, kiu tre ofte renkontas atencojn!" (Aplaŭdo)

En la kunsido prelegis, kiel speciala gasto, mondfama muzikisto s-ro Sovaĝanaso. Li rememorigis al aŭskultantoj la tragedion, pro kiu li devis travivi suferajn tagojn kun sago tra la korpo. Legantoj, ne estu surprizitaj. Ĉu vi ne

rimarkis verdan insigneton sur lia maldekstra brusto, kiam gazetoj kaj televiziaj kameroj sekvis lin vunditan? Verŝajne ne. Nu, vi sciu, ke mi estas kompleza. Mi klarigu. Liaj kolegoj antaŭe donis al li karesnomon Gamo, admirante lian elstaran talenton regi gamon. Tial li estas konata tiumonde kiel ja Gamo Sovaĝanaso. Tre malkomplike. Vi estis ĵus konvinkita, ĉu ne? Jes, li estas ... ja Gamo.

Necesus aparta klarigo pri la tragedio de la muzikisto por s-ino Cathy Schulze en Kalifornio, ununura ne-japana leganto de Heroldo de HEL. Sed domaĝe. Spaco mankas. La redakcio ĉiam postulas al kontribuontoj ne tre longan kontribuafon por eviti plendon de tajpanto, kiu devas dum netigado pacienci doloron de la vertebraro antaŭ Macintosh kaj por ŝpari pres- kaj send-koston. S-ino, do unue iru al Ŝtata Biblioteko kaj malfermu lastajarajn dosierojn de "Japan Times", poste konsultu japanlogon pri la senco de la kunmetaĵo "ja/gamo", mi petegas. Tiele vi komprenos tuton de la afero (kaj la vortludon).

Li en subprema tono rakontis sian suferon. ---"Post la kirurgia operacio mi ne vizitis la lageton en la parko Syakuzii-Kôen, kie mi estis pafita de kanajlo. Mi tamen ne havas rankoron al homoj, ĉar mi profunde kredas ke homoj estas miaj bonaj amikoj. Mi vivas kvazaŭ migrobirdo kaj trovis salubran ripozejon en Koreio. De la loko flugis mi al Saporo. Ĉie, kien mi vizitas, mi apelacias al publiko ke ne plu okazu tia tragedio, kia trafis min. Paca kunvivado de ĉiuj Teranoj estas dezirata!"--- Lia prelego konkeris la tutan aŭskultantaron. Mi rimarkis la okulojn de leporaj patrinoj ruĝiĝintaj pro larmoj.

Mesaĝoj de ĝemelaj rondoj al la kunsido estis prezentitaj. Troviĝis inter ili tiuj el UEA (Universala Erinaca Asocio), SAT (Simia Asocio Takasakijama), KLEG (Koala Ligo En Grand-Ocenario), JEI (Juna Espero de Igvano), SES (Stelo En Savano) kaj aliaj. Sinjorineto Tigro, kies gepatroj

estas devenintaj de korea duoninsulo, voĉlegis la mesaĝon de seula grupo. La lasta parto de la amika saluto alvokas al ĉiuj samideanoj jene.

---"Nia urbo denove havas honoron okazigi internacian eventon en la venonta somero. Ankoraŭ en viaj oreloj reeĥas huraoj kaj aplaŭdoj de la sukcesplenaj 24-aj Olimpikaj Ludoj. Vizitu Koreion 1994! Ni elkore bonvenigos vin al la Universala Kongreso en la lando de kvieta mateno!" (Mi dankas al la LKK pro la utila Unua Bulteno)

Intertempe venis tempo por tagmanĝo. Antaŭ la vizito mi tre interesiĝis, kiamaniere oni havas kunmanĝadon en la klubaj renkontiĝoj. Mi eliris el la halo kaj sekvis amikojn sur la koridoro. Ho, mi vidis tra vitra muro papiliojn dancantaj en la tropika ĉambro, eĉ arbojn de kokoso kaj arbojn kun verdaj bananoj!

En la koridorfino estis du pordoj. Sur la maldekstra mi trovis lignan ŝildon "Nur Por Vegetaranoj" kaj dekstre "NE!-Vegetaranoj". Mi estis konvinkita kaj puŝis la maldekstran pordon. Agrabla betovena piansonato tuj envenis en miajn orelojn. La restracio estas sufiĉe vasta, kaj preskaŭ ĉiuj tabloj estis okupitaj de samideanoj. Kelnero vestita en lana smokingo kondukis min al la tablo de olda geedzparo Kamelo kaj juna geedzparo Kuniklo. Herbsupon kaj pladon de fritetita karoto kun brasiko portis la kelnero al la ronda tablo kovrita de verda tuko bone amelita. Kun postmanĝa kafo la veterano D-ro Kamelo rakontis al mi.

---"Inter la klubanoj estis problemo nesolvebla, kion vi facile divenas. La fono de la problemo estas historia, jam estiĝis antaŭ ol naskiĝo de la homaro. Tio tuŝas ekologian sistemon kaj principon de respektiva specikonservado. Fakte antaŭlonge okazis konfliktetoj kaj malordo en la klubo kaj en la parko. Sed ĉiuj muroj devas esti faligitaj. Por ke ĉiuj loĝantoj ĝuu packunvivadon, la delegitoj cerbumadis. Dum la kunsidoj ili prenis nenion krom akvo.

Post longa diskuto ni atingis unuaniman konkludon, ke ni havu respektivajn manĝejon kaj bankedon en la renkontiĝoj. Tial en la domo estas epikitaj du restracioj, ambaŭ liverantaj senkemikafajn manĝaĵojn. Nun neniu konflikto pri la manĝkutimo okazas, pace iras niaj aranĝoj. Ni ĉiuj estas antaŭ ĉio disĉiploj de nia Majstro".

La racia solvo de la malfacila problemo estas admirinda. Mi konstatis la belan harmonion ankaŭ en la intervjuoj kun aliaj samideanoj, inkluzive de ne-vegetaranoj. Ankaŭ la kuirarto de la kuiristoj de la restracioj estis kvinstele admirinda. Mi poste eksciis ke la nomo de la alia restracio por la karnovoruloj estas "Leono", kie oni povas lubriki la gorĝon per glasego da bonkvalita biero. Sur la pordo certe vidiĝis malgranda ruĝa stelmarko. (Tio tute ne aludas la famajn bierrestraciojn de la bierkompanio kun la urba nomo en Hokajdo. Ja pure hazarda koincido)

En la dua parto de la tago estis laborkunsido. Ĝin prezidis la sekretario Blato. Vi ne vidos ĉi tie la tutan laboradon, tial ke la redakcio ne disponigas al mi tro da paĝoj. (La kialon mi jam priskribis en ĉi tiu verketeteto. Interesitoj legu "La Rubujo Orienta"-n, la monata bulteno de la klubo, en kiu enestas ĝia protokolo) Por vi, energiŝparemaj je ĝenaĵoj, mi prezentu ĝian interesan parton.

---"K-do Lacerto atentigis: Mia fratino en Malajzio batalas kontraŭ japana kapitalo, kiu invadas la landon kaj detruadas naturon. Ĝi neniom hezitas por sia profito. Radioaktivaj ruboj ellasitaj de jpankapitala fabriko difektas sanon de loĝantoj, sed ĝi senkulpigas sin. Arbaro kaj maro de mia hejmloko mortas pro avidaj japanoj. K-ino Valabio simpatias kun Lacerto, dirante ke ankaŭ en Aŭstralio oni vidas iliajn arogaĵojn. K-do Struto konsideras ke japanoj konfidas nur monon. Li spertis tion, kiam li estis en la hejmkontinento. K-do Cigno rakontis, kion li vidis dum duonjara restado sur la lago de nordorienta

Ĉinio. En tiu lando furiozas monadorismo. Por gajni monon iuj eĉ vendas niajn naivajn amikojn al eksterlandoj. Japanoj estas la unuaj klientoj. K-ino Niktereŭto demandis al Cigno, ĉu lia diro aludas gek-dojn Pando en Ueno. Ŝi asertas ke li ofendis ŝiajn intimajn amikojn. Cigno denove staris antaŭ mikrofono kaj respondis: Mi ne pridiris malnovan aferon, sed kurantan fakton. Se vi miskomprenis min, tio ne estis kaŭzita de mi. Niktereŭto refutis lin de sia seĝo ke ŝi procesus lin al la Kluba Konflikta Komisiono. K-do Urso, prezidanto de KKK, diris ke KKK ĉiam pretas eklabori, kiam ĉia ajn plendoletero venos al si. Reprezentante du frakciojn Ĉevalan kaj Cervan, k-ino Zebro deklaris Komunan Proteston de la frakcioj. Oni vidis en la lasta R.O. vorton "ĉevalcerva" kiel insultan esprimon. Ĝi estas maldeca al iliaj familioj. K-do Hipopotamo subtenis ĝin, ĉar li mem antaŭ dek jaroj ofendiĝis pro insultaĵo "malhipopotamulo" kaj tiam KKK solvis la problemon pace.---

Mi atentigas ke la laborkunsido iris tute en samideana atmosfero. Imitinde kaj enviinde! S-ro Blato skribis en la fino de la protokolo. "Ni rikoltis grandajn fruktojn el la diskutado. Mi estas tre ĝoja, ke ĉijare ni neniun sendis al ambulanco pro debato". Nu, mi devas denove fari klarigon por s-ino Cathy. La du vortoj "ĉevalcerva" kaj "malhipopotama" estas japanismoj, kiuj signifas sencojn de "malsaĝa" "stulta" aŭ "idiota". Pro la jam menciita kialo mi ne aplikas detale. Bonvolu rekte demandi japanajn kursanojn de la Somera Kurso en San-Francisko.

Ĉiuj programeroj de la tago finiĝis per, same kiel la nia, rutina alvoko de kluba kasisto. Ni promesis baldaŭan revidon per manprenoj. Sinjorineto Sonserpento ĝisrevidis min kun kiseteto. Mi tre dankas al s-ro Blato kaj al ĉiuj amikoj en la parko. (Onisko)

————— Fabelis KAWAHARA H. Kazuya por distri sin mem

アイヌ新法 エスペラント語に

制定めざし苦小牧の星田さんら翻訳



翻訳した「アイヌ新法」の小冊子を手にする星田さん＝苫小牧市内の自宅で

復権の夢 世界へ

関連文献の一覧も

翻訳されたのは、北海道ウタリ協会が八四年の総会で可決した同法律案だ。「前文」と「本法を制定する理由」に始まり、「基本的人権」「教育・文化」「民族自立化基金」など、各施策にわたる六項目からなる。

九三年の国際先住民年に

合わせて、九二年十月から一年余り、苫小牧エスペラント会の仲間二人と共同で作業に当たった。翻訳と編集を終え、今年一月にはほぼ全文がA5判、二十一頁の小冊子にまとめられた。

法案策定の経緯やアイヌ民族を取り巻く状況、国際先住民年の国内外の動きと関連文庫一巻も付けてある。これまで、ドイツにあるエスペラントの団体「民族の自由のための国際委員会」や、カナダのロシヤなどの世界エスペラント協会(本部・オランダ)の専門委員らに送られた。その

アイヌ民族の復権に向けて長期制定が求められている「アイヌ民族に関する法律」(アイヌ新法)が、エスペラント語に翻訳された。作業を進めた苫小牧市糸井の苫小牧エスペラント会代表、星田さんら(左)は、翻訳した資料を主に海外へ送り、内容の紹介に努めている。

苫小牧エスペラント会新年会など


Novjara Kunveno (Bankedo) de TES k.a.

昨年はザメンホフ祭が出来なかったので、94年新年会を1月9日13時から星田宅で開いた。参加者5名。過去1年の活動を振り返って、米国での高校生射殺事件、アイヌ新法エスペラント訳等、今の社会の問題を先取りしてやってきたが今後もこの努力を進めようと語り合った。

今年の例会は1月17日から開始(月4回原則として月曜日本町公民館にて)。「機関誌で見たのでー」と Heroldo de HEL のコピーを持って朝日新聞が19日取材に来、その結果は25日朝刊道内版の記事になった。アイヌ新法の日エス対訳(解説付)の発行について、今あちこちに送っているところ。(星田)

各地へ届ける予定だ。アイヌ民族に関する文献のエスペラント語への翻訳はまだ少ない。国内では北海道エスペラント連盟が十五年前、知里幸恵さんの「アイヌ神話集」を翻訳出版し、世界に紹介した例など数えるほどだといふ。星田さんは「日本国憲法先住民条について、国外の人々の間まで理解が広がることには意欲がある。その手助けになれば」と話している。

星田さんは、高校時代にエスペラント語の習得を始め、四十数年のキャリアをもち、現在は日本エスペラント学会の評議員、北海道エスペラント連盟の委員長も務めている。エスペラント語は一八八七年、ポーランドの眼科医師ザメンホフ博士が国際平和を願って考案した。簡素化した文法と多様な表現ができる造語法が特徴。



分詞副詞の独立(絶対)用法について

ザメンホフは、<エスペラント(の語法)には、こうした用法は無い>と言っている。

Lingvaj Respondoj 参照

(註) 意識して<独立用法>で分詞構文を書くわけでないが、ついすっかり気づかずに書く場合が多いし、読む方も逐語的には意味がわかるのでその誤りに気づかない。

エス界に見られる独立用法の誤りの例文を示す。誤りであるが、理解のために。

(a) 日本の用例から

El aŭtiginte, trafis miajn okulojn la verdaj literoj de Hanoja Esperanto-Asocio, en <La Vera Kolombo>

熊木秀夫: <ベトナム訪問記>

文意は<自動車から降りると、ハノイ・エスペラント協会と書かれた緑の文字が、私の眼におつつかってきた>という、なかなかの名文?です。しかし el+aŭtig+int+e は、分詞副詞です。エス文法では、<分詞構文の意味上の主語は、主文の主語と同じです>から、ここでは(緑の文字)になるが、むしろ緑の文字が自動車から降りたのではない。こうした例文を、独立(絶対)用法と言う。ザメンホフはL・Rのなかで、質問に答えて<エスペラントには、そうしたもの(語法)は無い。この場合はkiamを、使いなさい>と教えている。(pri absoluta ablativo)

それで、次の文のように書くと、正しいエス文になる。

Kiam mi el aŭtigis, trafis miajn okulojn la verdaj literoj de Hanoja Esperanto-Asocio

(B) 韓国の例から

Reveninte nud-mane, la unua problemo, kiu n mi devas urĝe solvi, estis la viv-rimedo.

<Neforgesebla Figuro> traduk. Hjpın Li en <Koreaĵoj, Noveloj, Popol-rakontoj> 文例は 韓国エス協会発行 <エス・韓国語辞典>編者、李 在賢さんの訳した小説の中にある文です。

文意は、小説の主人公が金策に出て<空手で帰ってきたが、僕がさしせまってすぐに解決しなければならない最初の問題は、生活費だ>でしょう。しかしここでも独立用法になっています。帰ってきたのは(最初の問題)でなくて(僕)のはずです。正しくは、

<Kiam mi revenis, la unua problemo, kiun mi devis urĝe solvi, estis la viv-rimedo>

(c) 中国の用例から

<Enirinte la duan korton, vidigas la majesta centra halo de Liu Bei (la unua imperiestro de Shu regno) Zhang Ping

el <Vojaĝanto> n-ro 6

Chengdu-Memlernado-grupo de

Esperanto, Sichuan, Ĉinio

中国、四川省、成都市 (成都エスペラント独習グループ)

筆者は張 平さん。成都発電所の工員。青島・太平洋大会で、告知板の私の<会いたい>をみて、ホテルの部屋に訪ねてくれた好青年だ。原文は観光地紹介文である。<二番目の庭に入ると、李王の立派な大広間がある>の意味か。これもおかしい。独立用法です。ホールが歩けるはずがない。kiam をつかって、直したい。ここでは eniri (自動詞)を、他動詞的に使ってるが、これも誤りです。それで 正しい文は、

Kiam mi eniris en la duan korton, vidigas la majesta halo...>

(註) 自動詞の前に前置詞がついてる合成語は、他動詞に変わることが多い。しかし、付けても自動詞で、変わらないことも多い。

<学習の頁 参照>

ザメンホフから、直接、学ぼう

<Lingvaj Respondoj> (n-ro 118)

En Esperanto la adverba participo [^]ciam rilatas la subjekton de la [^]ĉefa propozicio. Sekve oni povas diri "farinte(=kiam la leono faris)la dividon, la leono diris" sed oni ne povas diri "la dividado estante farita(= kiam la divido estis farita)la leono diris"

En via frazo "la reĝo kunvokis siajn konsilistojn, por ke, [^]ĉiu el ili eldirante sian opinion, li povu fari decidon" ni povas ja tute bone anstataŭigi la substrekitan esprimon per "kiam [^]ĉiu el ili eldiras sian opinion" aŭ per la pli mallonga "aŭdinte la opiniojn de ĉiuj".

Respondo, La Revuo, 1907

Pri la uzo de la adjektivaj kaj adverbaj participoj (117)

Via opinio pri la adverba participo estas tute prava: adverba participo povas esti uzata nur tiam, kiam [^]ĝi rilatas al la subjekto de la frazo. Se ni deziras per participo esprimi la sencon: <kiu...as>, tiam ni devas uzi nepre adjektivan formon de la participo; la adverbajn formojn ni uzas nur anstataŭ: <kiam li ([^]ĝi, ŝi k.t.p.)...as> aŭ <car...as>. Anstataŭ: <La unuaj vojaĝantoj kiuj traveturas Eŭropon.> ni devas diri: traveturantoj, La vorto <traveturante> signifas: kiam ili traveturas.

Respondo al M.S en Belga Sonorilo, 1906

Gaston Waringien--K Kalocsay


< En Esperanto ne ekzistas participo absoluta. >

Plena Analiza Gramatiko
de Esperanto (251p)

HEL新年会——初めての試みだが——

La unua Novjara Kunveno (Bankedo) de HEL

1月22日夜(定刻は17時半)狸小路2丁目のライオンに集まったのは11名。岩見沢、苫小牧から各々2名、あとは札幌のメンバー。札幌市内は至る所ツルツル路面で、転んで骨折し、恐しくて夜出歩けない人、ちょうど試験の監督にあたった人もあって、人数は少なかった。だが皆でにぎやかに今年のUKのKaravanoのこと、韓国の事情や国民性と将来、(Radio Pekin)-anino 来訪記事の「ウッソー」は「うそだ」、岩見沢合宿、先住民問題など、自由な話し合いは場所を変えて22時まで続いた。初めての試みだったがこれでいいか、主催者側で何かテーマやプログラムを準備するほうがよかったか、考えたい。(星田)



P O E M O

Patrina Amo

En la monton venis novsezono,
Tra arbaro iras bruna urso;
Por nutraĵo antaŭ longa dormo
Nun de roko ĉasu ĝi al lago.
Ne nur salmojn hejmen revenintajn
Ĝi eĉ homan manĝis familion:
Al la id' utere nun kreskanta
Ĝi promesas sanktan belprintempon.

これは、かつてHELの広報誌だったLeontodoに載せるために送付いただいた原稿です。もう10年近くも昔のものですが、このまま埋もれさせるのは惜しいと考えて掲載させていただきます。なお、筆者の永田さんは、1990年に御逝去されております。謹んで御冥福をお祈りもうしあげます。

S-RO NIŜISATO EN TORONTO

Kiu estas s-ro Niŝisato? Se vi estas malnova esperantisto en Hokkajdo, certe vi iam renkontis lin. Se vi estas juna nova esperantisto, eble vi aŭdis pri lia legendo...

Kiam li estis studento de la Universitato De Hokkajdo kaj studis pri psikologio, li estis samtempe arda esperantisto. Li organizis plurajn Esperanto-kursojn en sia Universitato. Krome li montris al ni siatempe sian kulturan flankon, ludante gitare klasikan muzikon, precipe dum kongresoj de Hokkajda Esperanto-Ligo.

En 1961, estante 26-jara, li adiaŭis la Hokkajdajn esperantistojn, forflugis al Usono (North Carolina) por tie plue studadi per stipendio de la Fondaĵo Fulbrajto... Versajne neniu tiam supozis, ke li restados tiom longe en Nôrda Ameriko.

Post iom da jaroj, li sendis karton al Sappora Esperanto-Societo, ke li edziĝis al virino, kies sango estas de naŭ nacioj, el kiuj la plej multa estas egipta. Ĉu tiu karto venis el Toronto aŭ ĉu mi legis ie, mi ne plu memoras, sed mi havadis la ideon, ke li vivas en Toronto. Antaŭ pluraj jaroj mi demandis al la delegito de Universala Esperanto-Asocio en Toronto, ĉu en lia urbo loĝas s-ro Niŝisato Ŝizuhiko, kaj petis lin serĉi en telefonlibro. La delegito tre afable plenumis mian peton kaj informis min pri lia adreso kaj ke li estas — tiam "asista" — profesoro en la Universitato De Toronto (fako pri mezurado kaj taksado en la

Instituto Ontario Por Studoj En Edukado). Lia sukceso en profesio ne estis dubebla.

En la 1984a julio 11 ... en la flughaveno de Toronto mian edzon kaj min atendis s-ro Niŝisato, kiu rekonis min tuj, malgraŭ tio, ke mi ne vidis lin dum dudeko da jaroj. Por ni estis facile halti ĉe Toronto, survoje al Vankuvero, kie la 69a Universala Kongreso De Esperanto estis okazonta.

En la sekvinta tago mia edzo kaj mi vizitis lian hejmon per lia aŭtomovilo. De nia hotelo al lia domo estis distanco de duonhora veturado aŭtomovila.

Min impresis lia domo, kiu estas miksaĵo de japana kaj egipta ecoj, el kiu la japana iom superregas. Verda agrabla situo. Vasta ĝardeno. Enirante la vestiblon, oni tuj trovas miniaturan japanan ĝardeneton laŭ modelo de Templo Rjoan en Kioto. En lia laborĉambro pendas japana ideografiaĵo "Kvieto", kiu estas ankaŭ parto de individua nomo Ŝizuhiko.

Tiuvespere ni invitis lin kaj liajn familianojn: nome, la edzino Lorraine kaj filo Ira, 15-jara, al restoracio por kunestado. La problemo estis komunikado. S-ro Niŝisato povis kun ni paroli Esperante, kvankam li preskaŭ neniam uzis la lernitan lingvon pro sia okupateco. La filo parolas nur angle kaj komprenas franclingvon, kiun ni ne povas paroli. S-ino Niŝisato diris, ke ŝi povas paroli angle kaj krome iom germane. Mia edzo komencis paroli germane sed ŝi ne tiom scias, ke la interparolado okazus glate. En iu momento montriĝis, ke ŝi kapablas paroli en la afrikanso, unu el la du oficialaj lingvoj de Sudafriko, kie ŝi naskiĝis. Aŭdinte, ke ŝi povas paroli afrikanse, mia edzo kaj mi vigle komencis paroli en la nederlanda lingvo, ĉar ni ja bone scias, ke la afrikanso devenas el la nederlanda lingvo. La interparolo kun ŝi bonege sukcesis:

ŝi afrikanse, ni nederlandlingve. Tamen, kiam ni parolis kun ŝi, s-ro Niŝisato ne komprenis, nek lia filo. Ili ambaŭ unuafoje aŭdis, ke ŝi parolas afrikanse. En la interparolado de la 5 personoj estis uzataj 5 lingvoj: Esperanto, angla, afrikansa, nederlanda, japana. Por mia edzo kaj mi, kiuj kutimas facile komuniki kun alilandanoj per Esperanto sen lingva ĥaoso, estis iom malfacile alkutimiĝi al tiu lingva ĥaoso, kiu estas nenio alia, ol reala internacia socio. Eble vi dirus al mi: "Kial vi ne parolis kun la familio Niŝisato angle? Tiam la parolado irus glate." Jes, vi pravus. Sed nek mia edzo, nek mi povas paroli angle pli, ol kelkajn mallongajn frazojn, ĉar ni ne kutimas uzi la anglalingvon. Ni ja havas multajn geamikojn en Britujo, Kanado kaj Usono, kie oni uzas la anglan lingvon, sed kun ili ni kutimas paroli nur Esperante. Cetere ni ne volas subiĝi al la anglalingvanoj, dum ili ne cedas al ni paroli en niaj lingvoj.

Danke al la 5 lingvoj uzataj, ni bone interkompreniĝis kun la familio Niŝisato, uzante pluroblon da tempo pli, ol la konversado okazus en unu lingvo.

Por mi estis granda ĝojo revidi s-ron Niŝisato kaj konatiĝi kun lia familio, dum mia edzo ĝuis la interparolon kun lia edzino per sia nacia lingvo. Cetere s-ro Niŝisato gvidis nin tra la urbo Toronto kaj la ĉirkaŭaĵo tie, montris al ni la faman Akvofalon Niagara el kanada flanko. Post nete du-taga restado en Toronto, ni adiaŭis lin kun la certeco, ke li estas tre feliĉa en sia vivo en Kanado. Li ne forgesis peti de ni transdoni liajn salutojn al la esperantistoj el Hokkajdo, kiuj troviĝos en Vankuvero por la Universala Kongreso De Esperanto. Ho ve! Dum la kongreso mi renkontis s-inon Kitabatake kaj du aliajn el Hokkajdo, sed pro la homamaso kaj pro la programamaso mi forgesis transdoni lian saluton al ili. Tial mi nun volas plenumi la taskon pere de "Leontodo", ĉar mi ne dubas, ke s-ro Niŝisato volas saluti ankaŭ aliajn hokkajdajn esperantistojn.

エスペラント界をダメにするもの

カワハラ・カズヤ (仙台)

“学習の頁”の引用の仕方は適切ではなく、無礼である。第49号を読んでそう感じ、事務局に手紙をかいた。返事ももらった。12月の委員会でその手紙が話題にされたときいている。しかし、わたしの感じ方は異質らしい。第50号でも同様の仕方が見られた。地元の会員がなにも言えないのなら、外野席から発言するしかない。

何年ものあいだ、国内外のエスペラント会機関誌、雑誌を購読しているが、学習と称して他団体からの祝辞、個人の著書、他団体の機関誌から文法上の「誤り」「間違い」を引用する例などお目にかかったことがない。余計なお世話だ。たのまれもしないのに他人の文章のあれこれをあげつらうやり方は上品なことではない。北海道新聞の誤植を北海タイムスが訂正するようなものだ。書かれた内容を批評するのではなく、あれこれほじくりだして説教するのは、たんなるあげあしとりだ。

あのページの執筆者は「エスペラントの言語としての純潔を守る」目的で「敢えて」こういうやり方を選択したという。「敢えて」とことわるところをみると、本人もこういうやり方がまっとうなものとは思ってないのだろう。それが「誤り」「間違い」で、どうしても正さなくてはと言いはるなら、書いた本人につたえればすむことだ(相手は著名人。住所はすぐ分る)。なにも、それを教材にして Heroldo de HEL 読者を啓蒙するまでもあるまい。そんなやり方をありがたがるほど読者はおろかではない。

おおよけにされたものを、典拠を明示して引用したのだから問題はない、というのは理屈にならない。方法が「公正」で相手が著名人なら

なにを言ってもいいのか。だいたい「誤りです」「間違いだ」などと、引用された本人が所属してもいない団体の機関誌に、悪い見本として名ざして指摘することじたい、いっさいの「公正」と無縁だ。引用された本人と読者を不快にさせる。「言語としての純潔」というものを信じる自由を尊重するにしても、つまらぬあげあしとりなど見たくもない。

このやり方が横行するなら、辞書執筆陣に名をつらねる超一流人かエリート以外のエスペランチストは、なにも書けなくなる。「誤りだ、間違いだ、正しい文章を書こう」というキャンペーンのダシにされるのを承知で原稿をおくる非著名人がどこにいるのだ。わたしくらいだ。それでなくてもエス文の書き手がすくないのに会員をオドしては困る。やたら他人の文のデキを評論する人がいるから、書かない、匿名なら書くという人がいっぱいいてくるのだ。

「多少の誤りを気にせずエスペラント文章を書いてほしい」(大会での編集部よびかけ、第49号、p6というなら、それを受け入れる環境をつくれればいい。「正しいエスペラント」以外は許容しないほど、エスペラントは脆弱ではない。ニホン語だってそうだ。「正しくない」ニホン語をまじえて、われわれは生きている。

「誤り」「間違い」をおかさない、かしこい身の処し方はなにも話さない、書かない、ことだ。やる気のある人を萎縮させ、かしこいエスペランチストを増産させる原因のひとつがこのページのタグイなのだ。会話がへた、文法がなっていない、もっと学習しましょう、としたり顔であげつらう風潮。それに嫌気がさして離れていった人はいない、とはいわせない。これが積りかさなって、エスペラント界をダメにする。

これ以上はいわない。冒頭に記したように、わたしは、あのページの引用の仕方は適切でなく、引用された人びとにたいして無礼だと考えている。その一点にかぎって編集部の見解を知りたい。正式に回答してほしい。(940123)

エスペラント界をダメにするもの・補足
カワハラ・カズヤ

「エスペラント界をダメにするもの」は唐突にかかれたものではありません。49号発行直後の11月23日以降きょうまでの5往復にわたる事務局長とのやりとりのすえの産物です。事務局に手紙をかいたのは、委員会でかんがえてほしい問題だとおもったからです。

引用するのにもルールがあります。事務局の返答はわたしを納得させませんでした。ゲラをまもって編集部、事務局、委員長に送付しました。この号にのったものは、その元原稿に加筆、訂正をほどこしたのですが、主旨はかわりません。

「おまえの文の間違いをいわれるのがいやなのだろう」ときかれれば、そうだ、とこたえます。こういうやり方で啓蒙されたくありません。人間の感情だから、しかたないことです。添削を必要とするときは、キチンとしかるべき人におねがいしています。しかし、そんな個人的な理由で発言したのではないことは、本文を読めばおわかりとおもいます。

話さない、書かないを實行されている方々には無縁か、喝采のページかもしれませんが、わたしは、あのやり方はけっしてエスペラント界にとって有益だとはおもいません。それが公正な方法で、学習の効果があるのなら、どこかの機関誌、雑誌がとっくにやっています。人格、名誉を傷つけかねないやり方だから、だれもやらないんじゃないですか。

以上、読者有志を代表して投稿しました。

(940128)

名前のローマ字表記 について

三ツ石 清

日本のesp-istoで、エス文で手紙をくれる方に、苦情を言うのは悪いが、私の名前を正しく書いてくれない方が多い。

私の名前は、MITUISI Kiyosiです。これは訓令式ローマ字表記なのです。

ローマ字の書き方(表記)には、
訓令式(国定の) - Mituisi
ヘボン式(英語式) - Mitsuishi
Esperanto式 - Micuiŝi
さて我がくHeroldo>enhavo欄に
<Mituiŝi K>とすでに2回ありました。これは間違いです。

Mitui(訓令式) + ŝi(Esp式)
私はEsp式表記の使用を否定など無論していませんが、私自信は訓令式ローマ字主義なのです。ヘボン式表記は、使いません。

訓令とは、内閣総理大臣訓令のことです。日本の政府機関、自治体、民間等が、訓令式ローマ字の使用をそれぞれ訓令されたのですが、法律でないために、強制力がありません。政府機関で使用するのは、国立国会図書館と国立民族学博物館だけです。民族学博物館はJ E I顧問でもある梅棹忠夫氏が館長のときに

決めたのです。ちなみにこの博物館内には、英語の説明文が、まったくありません。私はお訪ねしたときに、梅棹さんに、<さすが梅棹さんだ>といいますが、<お気づきですか、さすが三ツ石さんだ>といわれ、紹介者の藤本達生さんと3人で大笑いしました。

SAT会員の諸君には(私はSAT会員では、日本最古参) <総理大臣訓令なんて>と思うでしょうが、その政府の決定に至る経緯は、自民党政治下の文部省的なものと言ったものでなく、あの訓令式ローマ字の仕組みは、民主的、先進的、むしろ左翼的とも言える思想を持った人士を含めての国語学者、運動家の研究の結集、長年の希望がこの訓令式表記です。KLEGのKonisi、J E IのIsinoの両氏の表記も訓令式です。最後に一言。ローマ字表記は、皆さん、一人一人の問題ですから(Esp式表記の方も多い) その表記は、各人の自由であるべきでしょう。私の場合は訓令式表記でなくて書かれることは困ります。Mituisi K

(ローマ字研究資料)

田丸卓郎<ローマ字文の研究>ローマ字教育会
(名著。ローマ字の古典)

<ローマ字のつづり方>

昭和28年8月 国語審議会建議

昭和29年12月 内閣告示

El redaktejo 編集部から

18頁のカワハラ・カズヤ氏の投稿は、個人攻撃ではなく、編集部とHEL事務局に対する意見と考へ、そのまま全文を掲載しました。

正式に発表された文章に対して、ここが文法上問題があると指摘して正すのは書いた本人に直接つたえればすむ。勝手に引用し「誤り」として指摘するやり方は問題であり引用された人にたいして無礼だと考へている。との氏の意見ですが、「個人の考へ方の内容ではなく、純粋に文法上の問題として取り扱う分には、引用することに問題はないと判断している」というのが、当方の回答です。

完璧な文章は時としてその意を伝えきれない場合があり、その人なりに表現することはままあることです。その表現を純粋に文法上の問題として考へた場合には「誤り」と指摘することが、引用された方の人格や名誉に影響を及ぼすことではないものとして考へております。

エス文の書き手が少ないのに会員をオドしては困る。との意見に対しては、逆に、「完璧な人間は存在しないのだからどんな人にも誤りがある。活字になったものでも文法上誤りがないと言い切れるものではない」と考へるなら、文法上の誤りをおかすことをそれほど気にせずエス文を書けるのではないだろうかと思ひます。

ところで、名前の表記については、なるべく Esperanto表記に統一するようにしたいと考へておりましたが、三ツ石氏が書かれているとおり、自分の名前はぜひこう書いてほしいという個人個人の考へ方があるため、今後は原稿に記載されたものをそのまま訂正せず載せることにします。

また、すでにお気付きの方も多いと思ひますが機関紙に記載されている北海道エスペラント連盟の住所は、supersignoを使わない場合の Esperanto表記です。

HEL大会で問題になっていた大会名称の記載方法同様に、この表記についても様々な意見があるので、そのうち紙面で意見討論を呼び掛ける予定です。

(阿部映子 Ejko Abe)

Heroldo de HEL
第51号 (1994.3.20)
北海道エスペラント連盟機関紙
編集部
〒001 札幌市北区北12西1パークMS602
阿部映子気付 電011-756-2291
郵便振替口座 小樽0-17075
北海道エスペラント連盟

★ INFORMO ★
★

La kunloĝado de Esperantistoj en Hokkajdo 1994

1994年北海道エスペラント合宿につきましては、すでにお手元に御案内が届いているとおり、5月13日(金)~15日(日)に、昨年同様岩見沢市法然寺にて行われます。万一、まだ御案内が届いていない場合には事務局まで御連絡ください。

事前に資料を送付しますので、それを読んでから参加コースを決めて、予習してきてください。参加しようかどうか迷う前に、まず資料申込みを！(4月15日までに資料代500円を振り込み願ひます)